

LA
VERDA
STELO



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

marto 2010



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretariejo

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, H.Roeters, N.R.Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Naskiĝtagoj
- 5 Pri la nordo
- 9 Raporto de la sekretario pri la jaro 2009
- 10 Travintri en fremda lando
- 12 Nekrologo
- 13 Elektronikaj libroj enmerkatiĝas en Esperantujo
- 15 Esperanto-grupo Unterweser 15-jara

Ĉie en ĉi tiu informilo vi trovas
enigmojn.

Esperable vi ŝatas ilin.

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2010

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING-banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg
587, 1704 BH Heerhugowaard.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

aprilo

15 Beatrix Potter

29 vivanta gazeto

majo

27 kune manĝi

junio

24 10.00 Schimmelpenninckhuys

julio

22 10.00 Scandinavisch Dorp

aŭgusto

19 11.00 Je la bordo de la Hoornse meer, apud la Dreesflat

septembro


2 Ni parolas pri la ferioj

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>



La 19-an de aŭgusto ni piknikos sur la bordo de la Hoornse Meer, proksime de la stelo. Kunportu mem vian lunĉon kaj kafon aŭ teon.

Se pluvos, ni rifuĝos ĉe Johano.

marto

24 E.J. Begeman

aprilo

1 T. Bulk-Beenen

6 P. Kappen-v.d. Kamp

7 A. v.d. Meer

7 A. Hooymans

17 M.K. Heide

majo

5 Gonda Kruyer

7 G.C. Boer

11 J. Hennekam-Tijs,

11 J. van der Laan

23 Frans Schild

25 A. Hoekstra

27 W. Renken

junio

1 A.M. Oosterwijk-Dominicus

8 H. van Dalen

16 Harm Roeters

24 W. Rijnders

24 J. Snoek

julio

9 D. Langers

aŭgusto

10 Nelly Kiel-Klunder

16 Koos Scharroo

30 Johan Swenker

PRI LA NORDO

29 oktobro 2009

Kelkfoje ni ne havas protokolon de la pasinta fojo. Kelkfoje ni havas plurajn protokolojn. Ĉi-foje ni aŭdis du.

La pasintajn du semajnojn kelkaj aferoj okazis rilate al Esperanto. En la arkivo de Groningen okazis Tago de la Groningen-a Historio. Nia klubo estis invitita por instrui Esperanton per rapidkurso. Johan Swenker instruis laŭ natura metodo, kaj Nelly Kiel akompanis lin. Tiel minimume unu persono komprenis la celon de la demandoj. Ĉeestis entute preskaŭ dek personoj.

Ineke Emmelkamp iris al la Tago de la Groningen-a Historio por aŭskulti pri Thomson. Thomson estis la unua persono, kiu mortis dum paca misio. Li mortis en 1914 en Albanio. En Nederlando preskaŭ neniu konas lin. Sed kiam Ineke estis en Albanio, ŝi konstatis ke Thomson estas famega en tuta Albanio. En malnovaj paperoj ĵus ricevintaj Ineke legis nekrologon pri Thomson. Tiu nekrologo aperis en "La Holanda Pioniro", la organo de la Esperanto Asocio L.E.E.N. Thomson do estis esperantisto, kaj tio estis novaĵo por la preleganto pri Thomson.

Je retpaĝo de Ralph Niels oni povis sin ekzerci per la vortoj de la interreta kurso de Wil van Ganswijk. Tiu retpaĝo jam ekzistas ekde novembro 2003. Sed bedaŭrinde Ralph decidis, ke li finas ĝin. Feliĉe la filo de Wil estas teĥnikisto kaj povas publikigi la ekzercaron kiel parton de la kurso mem.

Wil van Ganswijk ĉeestis kunvenon de NGGE, kies temo estis "ludoj". Angla instruistino pri la hispana lingvo tie montris kelkajn ludojn por instrui

Esperanton. La temo por la vespero de la 29-a de oktobro estis ludoj. Tial Wil gvidis nin en poezia ludo.

La poezia ludo estas speco de ĵigo. Ĝi konsistas el 20 pecoj da papero; sur ĉiu peco estas strofo de poemo de Zamenhof. Entute 5 poemoj estis stranĉitaj. La celo kompreneble estas rekonstrui la poemojn. Diveni al kiu poemo strofo apartenas, estis ne tro malfacile, ni ja ĉiuj konas 'La Esperon'. Sed diveni la sinsekvon estis por mi ne eble. 'La Espero' ja estas la sola poemo, kiun mi konas. Fine de la vespero ni ankoraŭ ludis normalan kartludon pri Pinokjo. Komence la ludo similis kvartetludon. Je la fino la ludo fariĝis ĥaosa, sed ĝuinda.

12 novembro 2009

Unue Johan voĉlegis du protokolojn. Due ni parolis pri la Verda Stelo, nia klubgazeto, kiu post nelonge denove aperos. Ĉu estas dezirinde havi protokolkajeron krom la raportoj en niaj klubgazetoj?

Ĉu la enhavo de nia gazeto estas aprezata, ne nur de ni mem, sed ankaŭ de aliaj legantoj? Sciigu tion foje al ni!

Luit raportis pri siaj korespondamikoj, speciale pri Joseph.

Multo pri li estas ankoraŭ necerta. Ĉu li rajtos daŭre resti en Pollando, ĉu li sukcesos rilate al la studo ankaŭ dum la dua studjaro?

Ĉu li sukcesos pagi la studokostojn, la riparon de la kaduka komputilo k.t.p. Feliĉe estas homoj, kiuj pretas iom helpi lin, se eblas al ili.

Sekvantfoje du kubanoj ĉeestos nian kunvenon. Unu el ili prelegos pri Kubo. Nelly raportis pri la studsemajnfino en

Vlaardingen, en kiu ŝi partoprenis. Ineke sciigis, ke nova kasisto por Esperanto Nederland estas trovita. Nun mankas ankoraŭ sekretario kaj kroma estrarano. Iu el la redakcio de la 'Groninger Weekblad' intervjuis Ineke pri Esperanto, kaj oni fotis ŝin.

Por la temo de la vespero 'enigmoj' Nelly, Luit kaj Johan kunportis kelkajn.

Tiuj de Luit estis solveblaj, sed tiuj de Johan postulis pli da inteligenteco ol ni havis.

26 novembro 2009

Dum ĉi tiu klubkunveno du kubaj esperantistoj, Norberto kaj Yoandra, vizitis la klubon.

Johan bonvenigis la du gastojn, kiuj alvenis en Groningen la 25-an de novembro post vizito en Germanio. Ineke gastigis ilin. Ĵaŭde Nelly kondukis nin al Noordpolderzijl, la plej norda parto de nia provinco Groningen. Norberto kaj Yoandra ĝuis la venton. Ankaŭ en Kubo estas vento sed nur dum uraganoj! Poste ni vizitis la fokejon en Pieterburen, kaj la vilaĝon Eenrum. Bedaŭrinde pluvegis, kaj ni finis la ekskurson en la kafejo Hammingh en Garnwerd, kie ni manĝis 'kroketten'!



Dum la kunveno Norberto multe parolis pri sia lando, la nunaj kutimoj, la pasinteco, la vivo, la familio. Johan estis en Kubo antaŭ dudek jaroj por ĉeesti la tiaman kongreson.

Komence de la naŭdekaj jaroj okazis ŝanĝo de la sistemo en Sovetunio. Tio multe influis Kubon, ili ne plu ricevis grandajn 'subvenciojn'. Nun multaj homoj vivas per mono, kion ili ricevas de parencoj en Usono. Nun en Kubo estas multaj kontaktoj kun la nuntempa prezidanto de Venezuelo, s-ro Chaves. Raul Castro nun estas la estro de la lando. Sed kio okazos dum la venontaj jaroj? Kio okazos morgaŭ? Norberto kaj Yoandra ne scias.

La ĉiutaga vivo ne estas facila, sed ili ĝuas la familion kaj la Esperanto-aktivaĵojn! La du infanoj estas denaskaj esperantistoj. Ili opinias, ke ili vivas en bela lando, sia lando Kubo. Dank' al esperantistoj en Flandrio ili povas fari la trimonatan vojaĝon tra Eŭropo.

La landa Esperanto-asocio havas bonajn kontaktojn kun la registaro, la ministerio de kulturo.

La rezulto estas la organizo de la UK 2010 en Havano. Norberto kaj Yoandra ambaŭ havas taskojn en la organizado! Vizitu la kongreson!

Nur unu eta rimarkigo:

Kial ne pli da homoj venis al la kunveno? Vi parolas Esperanton por kontakti homojn el aliaj landoj. Gastoj el Kubo ne ofte venas. Bedaŭrinde vi ne ĉeestis, vi maltrafis bonan okazon konatiĝi kun du interesaj homoj.

10 decembro 2009

Ni celebris la naskiĝdatrevenon de Zamenhof.



Ĉiu kunportis ion manĝeblan aŭ trinkeblan. Ni manĝis, trinkis kaj babilis. Estis agrabla vespero.

7 januaro 2010



Ni restis hejme.....

21 januaro 2010

Ĉeftemo: Ineke prelegos pri Ĉinio.

Estas la unua kunveno en la nova jaro, ĉar pro la malagraba vetero la kunveno de la 7-a de januaro ne okazis.

Ineke sciigas, ke venontan dimanĉon, la 24-an de januaro, okazos radio-elsendo de VPRO pri "La kvara lando". Neŭtrala Moresnet iam estis tiu kvara lando, kiu limtuŝis la nunan Tri-landan punkton apud Vaals. Kelkaj esperantistoj revis pri la fondiĝo de monda Esperanto-ĉefurbo en Moresnet. En tiu elsendo aŭdeblis Wil van Ganswijk, kiu voĉlegos la poemon "La Espero" de Zamenhof.

Ineke kunportis kopiojn de artikoloj en la gazeto "Het Parool". La artikoloj titolas "Lingvo por pli bona mondo" kaj "Esperanto, artefarita lingvo ekvivas". La artikoloj estas bazitaj sur intervjuo kun Wim Jansen, akademia profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdam.

Luit sciigas, ke kiam li en Interreto serĉis informojn pri la Ruĝaksela Turdo li konstatis, ke en Vikipedio (la libera enciklopedio) troviĝas nur malmultaj sciigoj en la nederlanda lingvo, sed alklakinte "Esperanton", li trovis multe pli da informoj.

Johan, Wil, Ineke kaj Nelly ĉeestis la adiaŭan ceremonion de Tinie Lanooy-Nijlunsing. Parenco de Tinie sciigis al Johan, ke tiu poste ricevos kelkajn Esperanto-librojn k.t.p.

Johan ankoraŭ ne ricevis la mankantan kajeron kun la nomoj de la ĉeestantoj de kunvenoj, kiuj okazis antaŭ pluraj jaroj.

Luit ja havas kolekton de malnovaj informiloj "La Verda Stelo" (1979 ĝis inkluzive 1981).

Ineke retrovis artikolon pri la fondo de nia klubo.

Wil ricevis mesaĝon de nepino de s-ro Drewes Uitterdijk. Tiu sinjorino atentigis Wil pri la manko de la nomo de Drewes Uitterdijk en la reta Esperanto-kurso de Wil. Intertempe la nomo estas aldonita. En 1987 aŭ 1988 Gonda partoprenis klubkunvenon, sed ŝi ne povas memori, ĉu ŝi skribis sian nomon en iun ajn kajeron.

Ineke aliĝis al la Azia Kongreso en Ulanbatoro. Ŝi veturos tien per la Trans-Siberia Ekspreso. La pasintan jaron Ineke kvarfoje feris en Ĉinio. Antaŭ dudek jaroj ŝi estis en Ĉinio unufoje kaj intertempe multe ŝanĝiĝis en tiu grandega lando. Ne ĉiuj ŝanĝoj plaĉas al Ineke. Ekzemple en Ŝanhajo ŝi ne retrovis la iam tre ŝatatan kvartalon "Bund". Eksterlandanoj kaj ĉinoj nun ja povas kune viziti hotelon kaj restoracion, antaŭ dudek jaroj tio ne eblis.

Multaj ĉinoj ankoraŭ trifoje tage manĝas rizon. Rizo kun acidaj legomoj kiel matenmanĝo ne plaĉas al Ineke. En Ĉinio pano estas malofta manĝaĵo.

Kiam Ineke vizitis interretkafejon, ŝi vidis multajn ĉinojn, kiuj en komfortaj brakseĝoj amuziĝis per komputilaj ludoj. Ineke vizitis ne nur grandajn urbojn, sed ankaŭ la kamparon, kaj ŝi vizitis plurajn parencojn de ĉinaj geamikoj.

Belaj fotoj pruvas, ke en 2009 Ineke feris en granda kaj tre interesa lando, kaj ke ŝi renkontis multajn homojn.

Ineke regalis nin per kelkaj ĉinaj frandaĵoj, kaj ankaŭ bongustis la torto de Wil kunportita.

4 februaro 2010

En Esperanto-kunveno en Amsterdamo, la 14-an de februaro, Katalin Kovats prelegos pri Vincent van Gogh. Koos intencas iri tien.

Wil rakontis, ke ekzistas 'Museum Plus Bus' por maljunuloj. Per tiu aŭtobuso ŝi iris kun viringrupo el Groningen al la 'Van Gogh museum' kaj la 'Joods Historisch museum' en Amsterdamo. Estis donaco de la BankGiro Loterio kaj kelkaj aliaj instancoj.

En la gazeto 'Holanda Pioniro' Ineke trovis tre malnovan artikolon pri la fondo de la Esperanto-klubo en Groningen en 1917. Ineke kaj Gonda kontrolis la kason de la klubo ĉe Luit. La kaso estis aprobata.

La temo de la kunveno estis gramatiko. Wil instruis pri la uzado de la litero n. Ni faris diversajn malfacilajn ekzercojn. Ekzemple:

Mi enrigardis malantaŭ la portreto.. por vidi la dua.. sekreta.. pordo., sed mi vidis nur araneaj.. retoj.. kun sekaj.. kadavroj.. de muŝoj., kiuj.. ne sukcesis savi sia.. vivo...

Tiu.. belega.. kolekto.. de bataliloj.. havas la valoro.. de tri milionoj.. da dolaroj., laŭ la diro.. de la gardisto. K.t.p.

18 februaro 2010

La 18-an de februaro okazis nia jarkunveno. Kiel ĉiam ĝi estas ankaŭ normala klubkunveno. Tio signifas, ke ni multe babilis. Komence ĉeestis nur malmultaj personoj. Tial ni komencis babili.

Nelly Kiel voĉlegis artikolon pri sinjoro Oettinger. Kopio de la artikolo aperas en ĉi tiu informilo.

Dirk Rietdijk informis nin rete pri la

studentoj en Leeuwarden. Ili estas entuziasmaj kaj bone kunlaboras. Dum la unuaj lecionoj ĉeestis preskaŭ dek lernantoj. Kiel instru-materialon Dirk uzas tekstojn el la libro "La Eta Princo" en Esperanto kaj en la nederlanda kaj franca lingvoj. Li kompreneble uzis ankaŭ "verajn" instrulibrojn, kiel Zondervan en Manders kaj Tra-la-la.

Ineke Emmelkamp parolis pri alia lernejo en Leeuwarden. Apud la Zamenhof-park en Leeuwarden la Comenius-lernejo konstruas lernejon novan. La inaŭguro okazos la 17-an de marto. Samtempe la nova konstruaĵo ricevos sian nomon: Zamenhof. Tial la Esperanto-movado estas invitita. La lernejo jam kontaktis Kajto-n, kaj pere de Esperanto Nederland ili serĉas aliajn aferojn por la inaŭguro.

Kelkajn aferojn pri la jarkunveno vi jam nun devas scii:

- ni ne ŝanĝis la kotizon de la klubo.
- Ineke anoncis sin por la kaskontrolkomisiono. Ŝi volonte havus Gonda kiel duan personon. Ĉar Gonda ne ĉeestis, ni ne povis peti ŝin.

Alia interesa afero okazis al la enspezoj de nia klubo. Kolektanto de libroj de Agatha Christie iel sciis, ke nia klubo havis krimromanon en Esperanto de Agatha Christie. Li ŝatis havi ĝin, kaj ni forvendis la libron al li. Dum jaroj nenio okazis al nia biblioteko, tiel ke ni eĉ jam decidis fordoni la librojn, precipe al esperantistoj el nepagipovaj landoj. Kaj nun, hazarde, ni povis vendi libron.

RAPORTO DE LA SEKRETARIO PRI LA JARO 2009

Nia klubo havas 47 membrojn, do malkresko de 6, plus 12 abonantojn kaj 1 donacanton.

Kunvenoj

Ni planis 17 kunvenojn. La averaĝa nombro da vizitantoj de niaj kunvenoj estis 7. En la somerperiodo ni dufoje renkontis unu la aliajn dum kafotrinkado. La renkontiĝoj okazis en la 'Schimmelpenninckhuys' kaj en la ĝardeno de Nelly.

Kvar gastprelegantoj vizitis nin, Federico Faccio Peldez (Argentino), kiu parolis pri Hispanio, Gerrit Berveling pri sia vivo, Norberto Dias kaj Yoandra el Kubo vizitis nin dum kelkaj tagoj. Ineke kaj Nelly montris al ili Groningen.

La temoj de la ceteraj kunvenoj estis tre variaj: Vivanta Gazeto, Filmo, Ubuntu, Andersen, Serĉu la erarojn, Aŭskultu kaj respondu, Danci kun Kapriol'!, Ferioj, Ŝatokupoj, Ludoj kaj Enigmoj Jarkunveno, malferma vespero kaj Zamenhof-festo ankaŭ okazis.

En februaro kelkaj kunvenis kun Kapriol'! La grupo verkis tekstojn pri balfolkantoj.

La malferman vesperon vizitis nur membroj.

La membroj vizitis respektive studsemajnfinojn, la jarkunvenon de Esperanto Nederland, Malferman Tagon de UEA, kaj eksterlandajn kunvenojn.

Johan estis tagprezidanto de la kunveno de Esperanto Nederland.

Estrarkunvenoj

La estraranoj interkonsiliĝis per Interreto,

cetere ili kontaktis inter si telefone.

Kursanoj

Koos per <http://pingveno.nl> kaj Wil per <http://www.esperanto-cursus.tk> daŭrigis la instruadon de Esperanto per Interreto. Wil gvidis hejme studogrupeton, en kiu estis kvar partoprenantoj.

Revuoj

Nia klubo havis abonon je Monato kaj Horizontaal. Cetere ni ricevas la klubgazetojn de diversaj aliaj Esperanto-grupoj kaj sekcioj.

Raporto pri "La Verda Stelo"

Nia klubbulteno aperis en aprilo kaj novembro. Johan kaj Nelly preparis la bultenojn. La Verdaj Steloj estis senditaj al 75 personoj, ne nur al niaj membroj kaj abonantoj, sed ankaŭ al tiuj grupoj, kiuj sendas al ni sian bultenon, cetere al tiuj, kiuj prelegis dum klubvespero, kaj al UEA.

Raporto pri la biblioteko

La libroj el nia biblioteko troviĝas ankoraŭ grandparte ĉe Koos. Ni iam decidis fordoni la librojn, sed tio devas ankoraŭ okazi. Ni vendis unu libron.

Wil kaj Ineke regule kontrolas, ĉu estas propaganda materialo en la informejo de la urba biblioteko, kaj, se necesas, ili kompletigas la stokon.

Raporto pri la gratulservo

Gonda Kruijer forsendis ĉi-jare la gratulkartojn al la membroj okaze de ilia naskiĝdatreveno.

TRAVINTRI EN FREMDA LANDO



Multaj homoj (precipe maljunuloj, kiuj ne plu laboras) kelkajn semajnojn antaŭ aŭ post la jarŝanĝo ekveturas suden por travintri en regiono kie la temperaturo estas pli agraba ol en Nederlando. Tiuj homoj estas ne nur sufiĉe bonhavaj, sed ankaŭ "ruzaj". Kial oni suferu vintran malvarmecon, se eblas pasigi la vintron pli komforte?

Sed ne estas nur homoj, kiuj dum iom da tempo forlasas sian konatan "neston" kaj serĉas provizoran loĝejon en pli varma lando. Miloj, eĉ centmiloj da birdoj ĉiun jaron migras de siaj naskiĝlandoj al foraj landoj kaj tiel eskapas la morton pro malsato dum la vintro en siaj "patrujoj". Kelkaj birdospecioj traflugas nekredoblan distancon. La arkta ŝterno estas la ĉampi-

Dum la naskiĝdatrevena festo de Fiona la infanoj ludas jenan ludon. Fiona laŭtvoĉe nombras de 1 ĝis 100. Ĉiam kiam ŝi diras nombron dividebla je 3 aŭ finante je 3, la aliaj infanoj devas diri "bum". Kiel ofte la infanoj devas diri bum?

A. 30; B. 33; C. 36; D. 39; E. 43

ono inter la migrobirdoj: ĝi flugas proksimume 20.000 km-ojn de sia kovejo al la travintrejo, kaj poste la saman distancon reen.

Aliaj birdoj restas pli proksime al siaj kovejoj, kvankam ankaŭ ili ofte traflugas grandan distancon. Por pluraj specioj de birdoj Nederlando estas ŝatata travintrejo. De kelkaj specioj oni ne atendas, ke ili estas migrobirdoj. La tutan jaron ili estas en nia lando. Sed la birdoj, kiuj estas ĉi tie somere, migras suden por travintri, kaj samspecianoj (el pli malvarmaj regionoj) anstataŭas ilin vintre.

Sed estas ankaŭ birdospecioj, kiuj nur dum limigita periodo troviĝas en nia lando. Unu el ili estas la ruĝaksela turdo, kiu estas indiĝena en Eŭropo kaj Azio, kaj iom pli malgranda ol la rilata Kantoturdo. La nomo de ruĝaksela turdo devenas el la ruĝa antaŭa subflugilo. Ĝi estas 20–24 cm-ojn longa kun enverguro de 33–34.5 cm-oj kaj pezo de 50–75 gramoj. Ambaŭ seksoj estas similaj, kun tute malhelbrunaj dorso kaj supraj partoj, dum subaj partoj estas blankaj, kun nigraj punktoj en la brusto kaj tre markitaj ruĝ-oranĝkoloraj flankoj kaj antaŭaj subflugiloj.

Ankaŭ la vizaĝo estas malhelbruna, sed estas rimarkinda blanka superokula strio. Ili reproduktiĝas en nordaj regionoj de Eŭropo kaj Azio. Estas ruĝakselaj turdoj, kiuj estas loĝantaj birdoj kaj tute ne migras, sed aliaj (precipe de la oriento) devas migri (plej ofte nokte) 6.500-7.000 km-ojn por atingi siajn travintrejojn. Ili estas ĉionmanĝantoj kaj nutras sin el ampleksa vario de insektoj kaj tervermoj la tutan jaron, suplemente de beroj en aŭtuno kaj vintro, ĉefe de sorpoj kaj kratagoj.

En Nederlando travintras multaj ruĝakselaj turdoj. Sed kiam estas ege

malvarme, la birdoj pluen migras suden, aŭ translokiĝas al urboj, kie estas pli varme. Ofte ruĝakselaj turdoj estas kune kun aliaj turdoj, kiel grizaj turdoj.



Dum unu el miaj ĉiusemajnaj vizitoj al la urba bieno "De Wiershoeck" en Groningen (en la kvartalo Beijum) mi fotis ruĝakselan turdon, kiu sidis en pomujo kaj frandis kelkajn malgrandajn fruktojn. En nur kelkaj tagoj la birdoj (ruĝakselaj turdoj, grizaj turdoj kaj merloj) formanĝis preskaŭ ĉiujn fruktojn.

La vivmaniero de la griza turdo similas tiun de la ruĝaksela turdo. Ankaŭ ili reproduktiĝas en arbaroj de norda Eŭropo kaj Azio, kaj grandnombre migras suden por travintri en pli agrabla regiono. Ili nestas en arboj, kie la ino demetas kelkajn ovojn en simpla nesto. Malkutime inter turdoj, ili ofte nestas en etaj kolonioj, eble por serĉi protekton kontraŭ grandaj korvoj. Migrantaj kaj travintrantaj birdoj ofte formas grandajn arojn, ofte kun ruĝakselaj turdoj.

NEKROLOGO



La 29-an de decembro 2009 forpasis en Groningen je la aĝo de 94 jaroj Tinie Lanooij-Nijlunsing. Dum multaj jaroj ŝi estis anino de nia Esperanto-klubo. Kiel delegitoj de Esperanto Noord-Groningen, ĉeestis ĉe la kremacio kvar el ni, nome Johan, Nelly, Ineke kaj Wil. La lasta alparolis la parencojn de Tinie kaj la ceterajn ĉeestantojn.



Estimataj ĉeestantoj, "Tinie kaj ŝia amikino Riet Heide vizitis dum multaj jaroj tre fidele niajn klubkunvenojn ĝis la

printempo de 1997, kiel montris al ni la kajero kun nomoj de tiamaj ĉeestantoj. Tinie kaj Riet samtempe lernis Esperanton per gazetkurso en la jaro 1957. Multfoje ili uzis sian konon de Esperanto por ĉeesti kongresojn en kaj ekster Nederlando. Eĉ en la kongreso en Kubo ili partoprenis. Bedaŭris al Tinie, ke ŝi tiam ne povis premi la manon de Fidel Castro. Ĉar mi estis longatempe sekretario de nia Esperanto-klubo, mi vizitis Tinie jen kaj jen, kiam ŝi ne plu povis veni al la klubo. Ĝis la fino de ŝia vivo la klubagadoj interesis ŝin. Kortuŝis min rimarkoj de ŝi kiel: "Mi supozas, ke mi ne plu povos veni

al la klubo", samtempe pensanta, "kiu scias, eble tamen". Por mi tiam jam estis tre klare, ke tio certe neniam plu eblos. Restos ĉe ni la rememoro pri firma, pozitiva virino, kiu estis tre danka por ĉia bono, kiun ŝi malgraŭ la perdo de fortoj kaj eblecoj, ankoraŭ spertis. Ni esperas, ke ŝi ripozu en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.



ELEKTRONIKAJ LIBROJ ENMERKATIĜAS EN ESPERANTUJO

Elektronikaj libroj en Esperanto ekzistas de multaj jaroj, sed ĝis lastatempe ne multe disvastiĝis, ĉar mankis oportuna maniero legi ilin. Per la teĥnika evoluo ĉiam pli oftigi la legado de elektronikaj libroj en naciaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperantujo du eldonejoj proksimume samtempe decidis enmerkatigi siajn produktojn en elektronika formo. La reta librovendejo de Sezonoj ankoraŭ estas en eksperimenta fazo kun du senpage elŝuteblaj libroj en du formatoj, dum Flandra Esperanto-Ligo jam proponas tridekon da aĉeteblaj libroj en tri malsamaj formatoj. Esperantlingvaj elektronikaj libroj estiĝis kun la enkonduko de komputila tekstoprilaborado, kaj komencis disvastiĝi en komputilaj retoj jam en la unua duono de la 1990-jaroj, sed antaŭ ol la populariĝo de Interreto la libroj estis konataj de relative malvasta publiko.

La unuaj elektronikaj libroj estis simplaj tekstodosieroj, kie pro la teĥnikaj limigoj tiutempe la Esperantaj ĉapeloj estis anstataŭigitaj per iksoj. Pli allogaj kaj facile legeblaj variaĵoj aperis unue kun la estiĝo de Tut-Tera Teksaĵo kaj la ekuzo de la signokodo latino 3, kiu ebligis la montradon de ĉapelitaj literoj.

La sekvan paŝon direkte al granda publiko elektronikaj libroj faris kun la estiĝo de la formato PDF, kiu ebligas allogan tipografian aranĝon kaj enpaĝigon de tekstoj. Inter la pioniroj de elektronika eldonado estis la konata sveda esperantisto Franko Luin, kies virtuala eldonejo Inko antaŭ deko da jaroj publikigis pli ol ducent elektronikajn librojn en Esperanto.

La libroj estis libere elŝuteblaj el la E-

librejo de Franko Luin, sed multaj el ili pro kopirajtaj kialoj ne estis printeblaj - manke de porteblaj legiloj, printado estis la ĉefa maniero legi elektronikajn librojn for de la komputila ekrano. Post la forpaso de Franko Luin en 2005 lia E-librejo ĉesis funkcii, sed la libroj mem estis savitaj, kaj de tempo al tempo reaperas en diversaj retejoj, interalie en Ipernity.



Elektronikaj versioj de la revuoj *Monato*, *Esperanto* kaj *La Ondo de Esperanto* estas aboneblaj de kelkaj jaroj, sed legado de tutaj libroj ĉe komputila ekrano estas nekomforta, kaj printado tro kosta kaj neoportuna. Nur lige kun la disvastiĝo de diversaj porteblaj librolegiloj kaj evoluintaj poŝtelefonoj kun granda ekrano iĝis ebla komerca eldonado de elektronikaj libroj.

En kelkaj nacilingvaj merkatoj, precipe en Usono, granda parto de la haveblaj elektronikaj libroj estas ligita al specifaj teĥnikaj solvoj, kiel la librolegilo Kindle aŭ la kopiprotekta sistemo de Adobe. En Esperantujo tia strategio estus dekomence mortkondamnita, ĉar la merkato estas tutmonda, kaj la libroj devas esti legeblaj per loka haveblaj rimedoj. Konsekvence, la unuaj du Esperantaj eldonejoj, kiuj komencis enmerkatigi elektronikajn librojn, uzas neprotektitajn dosierformatojn, eventuale kun kaŝmarkoj kiuj permesas spuri la aĉetinton, se senpermesaj kopioj aperus en la reto.

En la retejo de la eldonejo Sezonoj la unuaj

du provlibroj aperis la 25-an de februaro, kaj jam estis elŝutitaj kelkcentfoje. En la retejo de Flandra Esperanto-Ligo aĉetebraj elektronikaj libroj aperis en januaro, kaj iliaj prezoj varias de 3,60 ĝis 15 eŭroj - iom malpli ol la prezoj de presitaj libroj, sed klare pli ol laŭ anticipaj informoj kostos la libroj de Sezonoj.

Fonto : liberafolio.org

Estas ŝnuro streĉita ĉirkaŭ la tero, simile streĉita kiel ringo ĉirkaŭ fingro. Estas ege longa ŝnuro de pli ol 40.000 kilometroj longa. Vi nun tondas la ŝnuron kaj enmetas kroman metron da ŝnuro. Vi tiam ĉie levas la ŝnuron iomete, tiel ke ĝi ĉie estas same for de la tero. Kiom da loko tiam estas inter la ŝnuro kaj la tero? Proksimume kiel elektrono, kiel bakterio, kiel gazeto, kiel kato aŭ kiel elefanto?

'Everiezing hengs toegezer'

Antoine Verbij

BERLIJN – Alles hangt met alles samen. Ook in Europa. Dan is het ook goed dat iedereen eenzelfde taal spreekt. Of zoals de beoogde EU-commissaris voor energiezaken zegt: „Iedereen, ook een eenvoudige bankwerker, moet Engels kennen, al was het maar om de gebruiksaanwijzing van de machines te kunnen lezen.”

Die nieuwe eurocommissaris heet Günther Oettinger. De minister-president van Baden-Württemberg werd uitverkoren zijn land in Europa te vertegenwoordigen. Duitsland hield zijn hart vast. Was hij niet te licht voor zo'n belangrijke post? Half januari doorstond Oettinger de confrontatie met het Europese parlement met glans. Meteen daarna begonnen de problemen. Op de persconferentie na afloop beantwoordde Oettinger de eerste vragen in het Engels. Hulpeloos keken de journalisten elkaar aan. Wat zei die man in

vredesnaam? De vragenstellers schakelden wijselijk over op het Duits.

Nu is het Duits van Oettingers ook al moeilijk genoeg te verstaan. Hij spreekt met het zware Zwabisch accent, waar ze in Baden-Württemberg zo trots op zijn. De slogan van de

'Wij kunnen alles, behalve Hoogduits'

deelstaat luidt: 'Wij kunnen alles, behalve Hoogduits.'

Duitsers hebben grote moeite met Engels. Eerder al was de natie het schaamrood naar de kaken gestegen toen de kersverse minister van buitenlandse zaken, Guido Westerwelle, op een persconferentie een Engelstalige journalist toebeet: „Hier ist Deutschland, hier wird deutsch gesprochen.” Hij verontschuldigde zich snel en nodigde de journalist uit

om bij een kop thee een gesprek in het Engels te voeren.

Het blijkt dus nog erger te kunnen. Op Youtube verscheen een filmpje met Oettingers oproep aan bankwerkers om Engels te leren. Daarna volgen beelden van een Engelse toespraak van Oettinger. Hij spreekt over 'Urrup', wat Oettinger-Engels blijkt te zijn voor 'Europe'.

Oettinger leest zijn tekst op van papier en spreekt echt alle woorden fonetisch uit. 'Policy' (beleid) klinkt als het Duitse 'Polizei'. En ook het idioom is Duits: „Everiezing hengs toegezer”, oftewel: „Alles hängt zusammen.”

Het filmpje 'Oettinger Talking English: Worse than Westerwave', werd meer dan 200.000 maal bekeken. Youtube heeft het, na een klacht van de organisatie van de conferentie, van zijn website gehaald.

Het Youtube-filmpje met Oettinger is te zien via trouw.nl/nieuws/europa

Wit trouw 2010, 6.2.2010

Nepre lernu Esperanton, ĉu ne?

Bets Dodebier trovis tiun rakonton en la ĵurnalo "Trouw"

ESPERANTO-GRUPO UNTERWESER 15-JARA | ESPERANTOGROEP UNTERWESER 15 JAAR

Ĉi-jare Esperanto-grupo Unterweser festos sian dek-kvinjariĝon. Tio okazos la 5-an de junio 2010. Jen la festa programo:

10h00 - renkontiĝo en gastejo en Brake

11h30 - tagmanĝo

13h30 - vizito de la navigacia muzeo

Poste kafoklaĉo en la gastejo.

Sekvos ankoraŭ pliaj detaloj pri la loko.

Aliĝeblo: kontaktu Anne Höpken

hoe_an-4@ewetel.net (aŭ telefone: +4947 314 837)



Dit jaar viert Esperantogroep Unterweser zijn vijftienjarig bestaan. Dat vindt plaats op 5 juni 2010. Het feestprogramma ziet er als volgt uit:

10.00 u - samenkomst in Brake

11.00 u - lunch

13.30 u - bezoek aan het Scheepvaartmuseum

Daarna koffie, thee en koek.

Details over locaties volgen nog.

Aanmelden: neem contact op met Anne Höpken

hoe_an-4@ewetel.net (of telefonisch: +4947 314 837)

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen